N. N. 34,

Estis plena mia ĉaro

tradukita de Joachim Gießner

1. Estis plena mia ĉaro
de maljunulinoj;
tra la urbo ili fie
sakris tuj sen fino.
Do sankte mi nun ĵuru:
maljunulinoj ne veturu.
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

2. stis plena mia ĉaro
de maljunaj viroj.
Dum veturo tra la urbo
sonis aĉaj diroj.
Do sankte mi nun ĵuru:
olduloj ne plu kunveturu.
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

3. Estis plena mia ĉaro
nur de junulinoj;
tra la urbo ili kantis
hele kaj sen fino.
Do sankte mi nun ĵuru,
ke nur knabinoj kunveturu,
Tiru, tiru, ĉeval', tiru, ĉeval'!

Traduko de la Germana poemo "Hab' mein Wagen" de N. N. 34 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-622-1257 (2012-10-22 07:10:32)

Tiu traduko troviĝas en `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html` *sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`. *Pri Joachim Gießner vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner`.